FN PER ANC 47


# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL    TRIMONATA BULTENO

Nº 51a (nova serio)    Nº 136a    SOMERO 1980

REDAKTAS : Jean GIBAUX 28 rue Raoul Dufy 76600 LE HAVRE

Eldonita, ekspedita de :

UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE    C.C.P. 283 40 H ROUEN

KOTIZOJ : Minimuma kotizo : 10.00 Fr. - Subtenkotizo : ek de 15 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto-Bulteno, sen membreco : 10 Fr.

"La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj"


## VORTOJ DE L ' NOVA REDAKTISTO

Karaj Gesamideanoj, Legantoj Kolegoj !

Vi legos en ĉi tiu numero de N E B pri ŝanĝiĝo de respondecoj en la sino de la Estraro de la Normanda Unuiĝo .

Ne kredu ke venis amaso da novaj kandidatoj por helpi al ni ! ( oni rajtas utopii, sed ne je tioma grado ! )

Ne, tute simple, pro sanstato aŭ familiaj zorgoj, estraranoj devis rezigni sian oficon, plenumitan depost... jardekoj. Dankegon al ili pro la longa, ofte pena laboro farita !

Sur min venis la tasko zorgi je la bonfarto de la Bulteno : Multaj envios min pro tiu plaĉa okupo: elekti inter la multaj leteroj, informoj, artikoloj, kiujn bultenisto kutimas ricevi de la legantoj .... sendube, povas okazi ke, pro abundo de materialo, mankas loko por enpreso, kaj, korŝire oni estas devigata prokrastigi la aperigon. Mi esperas ke, en tia kazo, vi bonvolos indulgi vian humilan servanton .

Kvankam mi neniam "rompis tri krurojn al anaso" ,mi promesas ke mi faros mian plej eblon por korekte plenumi mian rolon,

ke VI estu kontentaj je MI

Mi kaptas la okazon memorigi al vi la gravan rolon de la nia Bulteno por la lokaj Grupoj sincere, ĉu vi konas iun Grupon kie ĉiuj membroj ĉe-estas la kunvenojn ? La forestantoj iom post iom forgesas vin ! Sed pensu ke daŭre la Bulteno atingas ilin, kaj estu certaj ke, vidante la nomon de sia urbo, ili atente legos la artikolon kiun vi aperigos ! Vi anoncu kion vi faris en la Grupo., faras, aŭ intencas fari ...
( La Grupo en Le Havre, larĝe profitas je tiu avantaĝo ...
... kial ne ankaŭ via Grupo ? )
Sendu do artikolojn : vi jus legis ke mi prenas la riskon diri ke vi estu kontentaj je mi ....

Ĉu mi povas veti ke MI estos kontenta pri VI ?

Koran Dankon

Johano ĴIBO

Polycopié par le Groupe Esperantiste Rouennais - Dépot Légal -
Le Gérant : P.LEMARCHAND    2ème Trim. 1980

# ESTRAR - KUNVENO

La estraranoj de U N E kaj de la Normanda Federacio kunvenis en Yvetot ĉe Ges-oj Pottier la 27an de Septembro .

Ĉe-estis S-oj Quillaud Lemarchand, Loisel, Gibaux, Pottier. Senkulpiĝis S-ro Jouis kaj Sro Delaunay .

Elekto de nova kasisto : Sro Jouis demisiis el sia posteno pro sia sanstato. Post diskuto, la estraro elektas Sron Lemarchand por anstataŭigi lin ĝis la venonta Ĝenerala Kunveno. Li renkontos S-ro Jouis por informigi pri la laboro.

Telefonjarlibro Ĉiu persono instruanta Esperanton povas aperigi sian nomon en la flavaj paĝoj de la telefon-jarlibro en la rubriko " Profesoroj de Esperanto" Prezo : 70 F. por la tuta vivo ( senpaga se la rubriko jam ekzistas, kiel , ekzemple, en Seine Maritime )

Kunveno en Mantes-la-Jolie : La 25an kaj 26an de Oktobro, okazos kunveno de la Esperantistaj Naturamikoj el Rouen kaj Parizo. Estus bone ke aliaj Esperantistoj ĉe-estu .


Ekspozicio Lentaigne : Tiu ekspozicio nuntempe troviĝas en Rouen ĉe S-ro Lemarchand. Gia temo estas " La Esperanto-libro" kaj ĝi estas je la dispono de la Grupoj kiuj ĝin bezonas .

Bulteno : La maŝino de U N E nun fine estas riparita . S-ro Loisel bonvolas zorgi pri multobligado kaj sendado . S-ro Gibaux daŭre redaktos kaj preparos la banderolojn . Pro plialtiĝo de la poŝtaj tarifoj ni devos plialtigi la kotizojn kaj abonprezojn (10 Fr ; subtenkotizo ek de 15 Fr.)

Ĝenerala Kunveno 1981 S-ro Gibaux ekkontaktis en Asnelles S-ron Veron el Domfront kaj F-inon Line Domingo el Duclair. Ambaŭ bonvolas studi la eventualan organizadon de la venonta Kongreso . Ni ankaŭ kontaktos S-ron Tailpied el Trouville , aŭ provos la eblecojn en Etretat .

Vivo de la Grupoj La ĉe-estantoj raportas respektive pri siaj Grupoj .

Venonta Estrara Kunveno : La 6an de Decembro ĉe S-ro Loisel.



# VIVO DE LA GRUPOJ

C A E N

Invitita de la ĥoristaro de la Caen-a Universitato de la Tria Aĝo, pola amatora Varsovia ĥoristaro el proksimume 60 personoj restadis en Calvados-o dum deko da tagoj .
Inter la ĥoristoj troviĝis tri junaj geesperantistoj, kiuj petis kontakton kun eventualaj lokaj Samideanoj. Post rapidaj traserĉoj, oni telefone kontaktis, kaj invitis min por vespera manĝo kun kelkaj 150 personoj. La partoprenantoj estis disigitaj el kvar-personaj, naciece miksaj tabloj. La etoso estis kanta, amika, ĝojega. Sed, en preskaŭ ĉiuj tabloj, oni parolis aŭ geste, aŭ kriple, aŭ oni senpove mute interridadis. Male, en la esperantista tablo okazis daŭra, rekta, senpera kaj ĝisfunda vigla interŝanĝo de ideoj .
La fakto multe rimarkiĝis, kiel ankaŭ la kvinpinta verda signeto kiu strange ornamis la vestojn de la kvar liberparolantoj . La frazeto ŝebis: " ils parlent en Esperanto .... on devrait l'enseigner obligatoirement dans les écoles..."
La Universitato min petis fari unuhoran konferencon pri la Internacia Lingvo, en la Jurfakultato, kion mi akceptis : ĝi okazos la 13an de Oktobro posttagmeze ..

H.ROUSSEAU

Y V E T O T

Informkunveno, anoncita per artikoloj en " Paris Normandie " kaj " Courrier Cauchois " , kaj per afiŝetoj en kelkaj magazenoj, okazis en la junuldomo, la 1an de Oktobro .
Tri personoj aliĝis al la kurso por komencantoj .
La unua leciono de tiu kurso okazis mardon, la 7an de Oktobro je la 17a horo. La sekvantaj lecionoj verŝajne okazos ĵaŭde je la sama horo .
Unu persono anoncis sian intencon partopreni la duagradan kurson, sed, nuntempe, la horoj kaj tagoj de tiu kurso ankoraŭ ne estas fiksitaj .

D O M F R O N T

La ĉiusemajnaj kunvenoj rekomenciĝis. Estas konsilinde ke ĉiuj membroj ĉe-estu kiel eble plej ofte: regula uzado de la lingvo estas la plej bona maniero ĝin lerni .

G R A N D  Q U E V I L L Y

Ekspozicio okazis dum Junio en Laika Amikaro ( materialo de L.Lentaigne) dum unu semajno, okaze de la inaŭgurado de la Urba Centro. Kelkaj centoj da personoj vizitis ĝin, el kiuj kelkaj oficialuloj. Artikoloj aperis en Paris Normandie .
Kurso komenciĝos la 16an de Oktobro .

R O U E N

S-ro Lemarchand anoncas la rekomencon de la kurso (2a grada) meze de Oktobro, por la Naturamikoj .
Eble, 1a-grada kurso okazos por la anoj de la M.J.C. , komence de Oktobro .

# VIVO DE LA GRUPOJ

## LE HAVRE

Monataj Kunvenoj

1 7.05 - Silvia " Mia vojaĝo al Turkio "
La eventoj substrekis la agadon de la Islama mondo.
Antaŭ kelkaj jaroj, mi eltrovis Turkion ekster tiaj tragikaj aspektoj . La Eŭropanoj miras pri la orienta vivmaniero.
La historiemuloj ĝuas ĉie resumon de la mediteranea civilizacio.
Multaj invadoj modelis la landon ĝis la Islama " stabileco ".
La situoj estas grandiozaj. Cappadoce estas vasta klifa regiono kie la unuaj kristanoj sin kaŝis for de la islama persekutado .
La valo de Zelve prezentas siajn trogloditajn domojn .
Goreme famas pro la multnombraj preĝejoj . Eĉ la kristanoj rifuĝis subteren en la urbo Derinkuyu .
Laŭlonge de la okcidenta marbordo, nur monumentoj atestas pri la Romiaj konkerintoj : templo de Dydime, teatro de Aydin kaj Afrodisias .
Ne nur la popoloj oferis la nuntempajn pilgrimajn trezorojn , la Naturo mem kreis mirindaĵojn : Pamukkale, la kotona kastelo tie la fontoj spruĉis el la montaro kaj kreis kalkdeponitan kovrilon .
Turkio estas spegulo je mil facetoj. De Izmir la industria al Soĝanli, la kampara ... la araba civilisacio vin impresos !

Bonan Vojaĝon !

21.06 - " Petrolo "
Jes, ja tio estas diskutiga temo !
Ĉu ne estas realaĵo ĉiutaga ? J.Gibaux enkondukis resumon pri tiu stranga besto : " hidrokarbido" pli konata sub la titolo " nigra oro " aŭ pli simple " Petrolo " .
Ni memorigu ke ĝi rezultas el transformiĝo de rûbaĵoj de akvo-organismoj ke ĝin oni trovas sub niaj piedoj,en la interno de la Tero (ne ĉie) kien oni treserĉas ĝin ĝis 7 ooo metroj..
Prospektorado, borado, ekspluatado de tavoloj-fontoj .
Poste, transportado, stokigo de la kruda petrolo. Rafinado .
Fine... konsumado. La diskutado kiu poste sekvis ne tiom viglis kiom oni povus supozi : sendube, la fataleco de nia nuntempa dependo rilate al la tenantoj de la putojkaj ankaŭ al la profitantoj, neniigas niajn reakciojn pri tiu temo ?
Ĉu nia ŝajne potenca civilizacio bankrotos pro nura manko de tiu likvaĵo (apenaŭ bezonata ĝis antaŭ unu jarcento) tiom nemalhavebla nun kiom akvo aŭ oksigeno ?

Ĝenerala Kunveno

Kiam vi ricevos tiun bultenon, ĝi estos okazinta. Vi ricevis ĝustatempe la kunvokilon : bedaŭros nur tiuj, kiuj ne venis !
La protokolon vi legos en estonta numero de N.E.B.
Ni memorigas la konsiston de la antaŭa komitato :
Gesamideanoj Caron (Laŭrenco kaj Silvia - A.Chalm - J.Colombel - J.Gibaux - L.Laney - J.Langlois - Y.Lucas - J.Sery -

Kursoj : Malfermo dum Oktobro - gvidanto A.Chalm
Unuagrada ĉiuĵaŭde 19a horo ĉe M.J.C.
Konversacia ĉiumerkrede 19a horo ĉe liceo Oceana Pordo.

Komitato de Havra Grupo